**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2008**

## EN HISPANIO

Toño del Barrio verkis artikolon pri la influo de la novaj teknologioj en la disvolvo de Esperanto-komunumo. Ĝi estis publikigita en la teknologia forumo "Boletín de la Sociedad de la Información", kiun prizorgas la firmao Telefónica. Legu ĝin en: http://sociedaddelainformacion.telefonica.es/jsp/articulos/detalle.jsp?elem=6643

Se vi volas aŭskulti, aux eĉ kopii, la kanton **"Zorongo" de García Lorca**, kantitan de Miguel Fernández en Esperanto, vizitu: www.ipernity.com/home/liven

Por tiuj, kiuj ne ĉeestis la UK-on, Manolo Pancorbo partoprenis la Internacian Artan Vesperon per du kantoj: la pasodoblo **"La morena de mi copla"**, kaj la fama **"Granada**"; kompreneble, ambaŭ en esperanto! En suba ligilo oni montras la tradukojn de ambaŭ kantoj kaj ankaŭ filmeton kun la fino de mia prezento : http://www.ipernity.com/blog/mpancorbo/83678

Jesús M. García Iturrioz, kiel A-Komitatano por Hispanio, partoprenis la kunvenon de la Komitato de UEA dum la UK en Roterdamo.

Forpasis en Zaragoza la 23an de julio Victor Ortiz , Prezidanto de "Frateco" (dum multe da jaroj) kaj de "Fundacion Esperanto".

## ESPERANTA MONDO

**Zamenhofa medalo.** Civita Parlamento produktis arĝentan medalon honore al la Zamenhofa-jubileo de 2009. La medalo, realigita en Meksikio de juvelisto kaj artforĝisto estas aĉetebla kontraŭ kvindek eŭroj ĉe Fonduso Pro Esperanto, CP 28, CH-2301, La Chaux-de-Fonds, Svislando ( fonduso@esperantio.net )

Fama usona reĝisoro (Sam Green) produktas eksperimentan **filmon pri esperanto** “The universal Language”. La filmado komencis en 2005 kaj ankoraŭ oni ne konas la finan daton.

Tre sukcesa kongreso de Tutmonda Ĵurnalista E-ista Asocio okazis en Vilnius (Litovio) Partoprenis pli ol 180 personoj.

En la Ĉeha urbo Svitavy kaj laŭ la agado de Ĉeha Esperanto-Asocio oni inaŭguris Esperanto-Muzeon publike vizitebla.

DVD kun la simpla titolo "Esperanto" aperis la 10-an de septembro 2008 kiel aldonaĵo en la grava pola tagĵurnalo ”Gazeta Wyborcza” kun la rekorda eldonkvanto de 364.000 ekzempleroj. Ĝi aperis en ĉiuj eldonoj de la gazeto kiel senpaga kromaĵo, kaj la aperigon de la disko en la gazeto financis la urbo Bjalistoko. La diskon kreis la organizaĵo E@I laŭ la mendo de la urbo Bjalistoko.

Internacia Junulara Kongreso **IJK-2008** en Szombathely (Hungario) lom da ciferoj: 365 personoj el 36 landoj inter ili Hispanio. La plej aĝa partopreninto havis 74 jarojn, la plej juna: 2 jarojn. La kongreso estis organiziita de TEJO, la junulara sekcio de UEA kies celo estas popularigi internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto. Ĝi defendas kulturan riĉecon de lingva diverseco, homaj rajtoj de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj.

18-minuta filmo en Esperanto pri la venonta **kongresurbo Bjalistoko** estas spektebla en jena adreso: http://itvc.pl/?link:szczegoly_klipu,id:1015

La 9an Septembro aperis nova **tutpaĝa anonco** en Esperanto en la franca ĵurnalo **"Le Monde"**, pagita far la japana mecenato Etsuo Miyoshi. Videbla per: http://www.fileqube.com/shared/dbTkhHw102534

Pere de E-mule oni povas senpage akiri plurajn esperanto-filmojn: Angoroj, Kinoarto kaj ni, Kiam Parizo estis Parizo, ankaux por ni esperantistoj, Babel' (plurfoje premiita en diversaj internaciaj konkursoj), Mefisto (Oscar-Premio), Esperanto (de UEA), ktp.

**VENONTAJ KONGRESOJ**

4-11 oktobro. 16-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Salou (Tarragona). Luis Serrano: luis_serrano@ya.com

13a Andaluza Kongreso de Esperanto: Córdoba, 7 ĝis 9 Novembro 2008. La sidejo de la kongreso estos la Junulara Gastejo de Kordovo, kiu troviĝas tuj apud la mondfama Moskeo. José María Rodríguez: esperanto14@ono.com

6-8 decembro. 34ª Kataluna Kongreso de Esperanto. Sabadell (Barcelona) Llibert Puig: l.puig@esperanto.cat

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

En la listo de la nova estraro de la pasinta numero mankis la librotenisto: Raúl Martínez Anguita, jen la kompleta **nova estraro** por 2008-2012: Prezidanto: Arturo Jiménez, Vic-prezidanto: Pedro Hernández Úbeda, Sekretario: Felix Jiménez Lobo; Voĉdonanto-Boletín: Angel Arquillos; Voĉdonanto HEJS: Miguel Hernández; Voĉdonanto: Juan Trenado.

La 67-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO havis, dank'al la klopodoj de **Alejandro Pareja,** profiton da **pli ol 4.000 eŭroj**, eble la plej alta en la historio de la HEF-kongresoj .

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas **ĉiulunde**, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7. Tel. 91 446 80 79.

Juan del Castillo gvidos konversacian rondon la **6an de oktobro**, je la 18,30h. Temo "Kriza somero". Loko: Rodríguez San Pedro 13-3º-7

**18-an de oktobro**: tagmanĝo aŭ vespermanĝo en vegetarana restoracio, precipe por konatigi tiun kuirarton al tiuj, kiuj ne konas ĝin. Organizas Pedro Hernández.

Monate, la unuan sabaton (**4-an de oktobro**), Pedro Hernández gvidas babilrondon en la irlanda trinkejo "Finnegans" (Plaza de las Salesas). Por konfirmi horon demandu al Pedro Hernández: esperantio@ono.com

Por esti informita regule pri tiuj aferoj kaj aliaj kiujn oni organizos en Madrido, aliĝu al la listo "esperanto_madride"; tiucele sendu malplenan mesaĝon al

<< **esperanto_madride-subscribe@yahoogroups.com** >>

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid